Bulteno de la

# Londona Esperanto-Klubo

londonaesperantoklubo.com

Januaro - Februaro 2025

## Kluba programo

### Januaro

3. **Kluboj fermitaj pro novjaro**.



10. **Novjara festo** Ĉeesta kunveno en Highbury.



17. ***Cafard*** **(serioza desegnofilmo, 12j+)** (Montras Klaas Dijkstra).



24. **Andoro: ĉio, kion vi volas scii** (James Hawkey).



31. **Lingvo NEO: Esperantido kreita en la 1960-aj jaroj.** (Martin Ptasinski).




### Februaro

7. **Nia Damo de Parizo: Rekonstruado de katedralo** (Pierre Grollemund).



14. **Restoracia kunmanĝado** Vidu la artikolon.



21. **Sekvi Renat(ism)on venonte!** (Ahmad Mamduhi)



28. **La edzino de l' temp-vojaĝanto: plej malkutima amhistorio** (Istvan Ertl)



## Letero de la vicprezidanto

*Karaj LEK-anoj,*

Ni esperas, ke ĉiuj klubanoj ĝuis pacajn kaj plaĉajn vintrajn feriojn. Por aklami la novan jaron 2025, oni invitas vin al novjara festo vendrede la 10-an de januaro, ĉe nia kutima kunvenejo. Alportu manĝaĵetojn aŭ dolĉaĵojn se vi volas. Krome, se Patro Kristnasko ja plenigis vian ŝtrumpon per tro da donacoj, kaj se via librobretaro superbordiĝas, kial ne uzi tiun ĉi aranĝon kiel neformalan brokantan foiron por aĉeti kaj vendi malnovajn E-ajn librojn, revuojn aŭ K-diskojn? Venu festi la komencon de 2025, ĝuante bonan kunestadon, trinkaĵojn, kaj babiladon!

Ĉe nia lasta decembra kunveno, ni interalie kune kantis «La Iamo Longe For». Se vi ĉi-momente kontrolos la Facebook-grupon aŭ Telegram-grupon de LEK, vi povos aŭskulti tie registraĵon de tiu sama kanto farita de la Londona Esperanto-Ĥoro en 1983. Fondita en 1976 de karmemora John Brownlee, la ĥoro komenciĝis kiel modesta grupo da LEK-anoj kun akordiono kaj gitaro, sed ĝi rapide kreskis por fariĝi kvarvoĉa harmonio. Ĝi kantis ne nur ĉe LEK-aranĝoj, sed ankaŭ ĉe diservoj, ĉe multaj Britaj Esperanto-Kongresoj kaj eĉ internacie, inkluzive de la Universala Kongreso en Antverpeno en 1982. Kvankam la ĥoro nun ne estas aktiva, ĝia spirito daŭras en niaj programoj, kaj eventuale povos inspiri novajn kantemajn esperantistojn por krei modernan evoluaĵon de tiu speciala ensemblo. Se vi interesiĝas pri ĥorkantado aŭ muzikumado, jen atendas via podio…

Ne forgesu remembriĝi por la jaro 2025, kion vi povas facile plenumi aŭ papere, aŭ per interreto: https://londonaesperantoklubo.com/membriĝo.html

*Ĝis baldaŭ, Gabriel*






Murpentraĵo de *Cable street*, ĉe flanko de St George's Town Hall, E1 0BL

# La batalo de *Cable street*

La ĉisupra foto montras murpentraĵon en la orienta fino de Londono. Ĝin desegnis Dave Binnington en 1979, por memorigi strat-batalon de oktobro 4a 1936.

## La kunteksto

En la jaroj 30-aj, ekzistis faŝisma politika partio en Britio, la BUF. Kvankam ĝi havis iam eĉ 40000 anojn, ĉiam estis multaj kiuj forte kontraŭis ĝin. La partion fondis en 1932 polikisto Oswald Mosley. Mosley estis, oni diras, tre ĉarma ulo, kun tre malkonstanta politiko. Dum lia kariero li estis ano de pluraj partioj, ĝis kiam li fondis propran. Dum Mosley iĝis pli kaj pli ekstrema, lia partio perdis subtenantojn.

## La batalo

La BUF planis marŝi tra orienta Londono je oktobro 4a 1936. Kvar grupoj marŝus tra la stratoj, ĝis kvar apartaj lokoj, en kiuj prelegus Mosley kaj aliaj. Multaj uloj protestis la marŝon antaŭ ol ĝi okazis, kaj cent mil subskribis peton ke oni ne permesu ĝin. Je la tago de la marŝo, eble tri mil faŝismuloj ĉeestis, kontraŭ eble cent mil kontraŭ-protestantoj. La kontraŭuloj estis de multaj etnaj kaj politikaj grupoj. Ankaŭ ĉeestis ses mil policanoj.

Diversaj bataloj okazis dum la marŝo, dum la kontraŭfaŝismuloj provis malebligi ĝin. La polico apartigis batalantojn, sed ankaŭ malpermesis ke homoj libere iru, eĉ dum la faŝismuloj havis tiun eblon. Polico eĉ detruis standardon de grupo de kontraŭfaŝismuloj.

Fine, la polico ordonis ke la BUF ne daŭrigu la marŝon en tiu parto de Londono, sed permesis ke ili marŝu en la okcidento de Londono. La marŝo finiĝis ĉe Hyde Park.

## La sekvoj

La batalo estas citita kiel "la momento kiam brita faŝismo estis venkata." En 1936 iĝis kontraŭleĝe uzi politikajn uniformojn, kaj organizantoj de amasprotestoj bezonis antaŭpeti permeson.

## La pentraĵo


Oni komencis plani murpentraĵon en 1976, kaj petis al artisto Dave Binnington ke tiu kreu ĝin. Unue, pentrado daŭris de 1979 ĝis 1982, kiam la artisto forlasis ĝin post kiam oni defektis ĝin per dekstrulaj sloganoj. Laboro rekomencis en 1982, fare de Paul Butler, Ray Walker kaj Desmond Rochfort. Ĝi kompletiĝis en 1983. La bildon oni atakis plurajn fojojn poste, sed ĉiufoje oni riparis ĝin.

*Phil Housley*

Sed ĉiam gravas la volo de niaj klubanoj. Iam ni devos kunveni por trovi tion kion oni volas. Se vi havas opinion, ne timu prezenti ĝin por diskuto. Ĉu eble ni estu pli interage, ekzemple per pli da lud-vesperoj? Ĉu ni organizu pli da eventoj je aliaj tagoj aŭ horoj, aŭ en aliaj lokoj?

*La komitato*





## Novjara festo kaj foiro

Je la 10a de januaro okazos la tradicia novjara festo de la klubo. Ni kutime manĝas ion kune, kaj ni petas al la anoj kunporti ion. La manĝo estos tute neformala, do ĉio estu manĝebla per fingroj.

Kiel aldonaĵon, ni havos malgrandan foiron aŭ bazaron. Se vi havas esperantajn aferojn kiujn vi ŝatus vendi aŭ interŝanĝi, bonvolu kunporti ilin. Ni ne aranĝos ĝin formale, sed se vi havas malnovajn librojn, revuojn, aŭ ion ajn, jen okazo por refreŝigi vian kolekton.

## Planoj por 2025

Ni bezonas daŭrigi nian agadon por pligrandigi la klubon, kaj informi pri ĝi. Ni komencis diskuti inter ni, kaj havas kelkajn ideojn, sed ni scias ke la klubo ne sufiĉe faris lastatempe, kaj ni bonvenigos ideojn.

Unu ideo estas ke ni trovu kaj kontaktu aliajn grupojn kiuj rilatas lingvon aŭ Esperanton. Ekzemple, estas kluboj en lokaj universitatoj, kun kiuj ni havu rilaton.

LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

## Pri la bulteno

Se ĉio okazas laŭ plano, ĉi tiu bulteno estas iomete pli longa ol la kutimo. Mia ideo, kio ĝis nun estas nur ideo, estas ke se ni povos krei ion sufiĉe belan kaj interesan, ĝi servos ne nur por informi al klubanoj, sed ankaŭ povus allogi al aliuloj, kaj montri ke la klubo estas reala kaj aktiva.


Ĉu eble vi ankaŭ rimarkos ke mi mem verkis la plimulton? Tio bedaŭrinde ne estos tre daŭripova, do mi volas denove peti ke vi klubanoj kontribuu. Kontribuoj povas esti de iu ajn speco:

- Raportoj pri esperantaj eventoj
- Informo pri venontaj eventoj
- Interesaĵoj el historio
- Artikoloj pri lokoj aŭ eventoj en Londono
- Rakontoj, pri io ajn
- Opinioj aŭ leteroj pri la klubo
- Petoj por opinioj de aliaj anoj

Ĉu io en tiu vekas ion en vi? Bonvolu diri!

*Phil Housley*






## Restoracia vespermanĝo

La kluba vespermanĝo okazos la 14-an de februaro en la kartvela restoracio "Tbilisi" (tbilisi-restaurant.co.uk), kie okazis la evento lastjare. Ĝi troviĝas proksime de la kluba renkontiĝejo kaj apud la stacio Highbury & Islington. Ni renkontiĝos ĉe la restoracio je la 7:00 ptm. La adreso estas 91 Holloway Road, N7 8LT. Partoprenontoj estas petataj anonci sian partoprenon (antaŭ la 9-a de februaro) al Julian kaj Maria nur per ret-mesaĝo al mail@jnagele.net, aŭ persone dum la novjara festo.

# Londona Esperanto-klubo

La Londona Esperanto-Klubo estas Esperanto-asocio en Londono (Britujo), kiu zorgas pri la disvastigo de Esperanto en Londono kaj organizas la kulturan vivon de la komunumo parolanta Esperanton en Londono kaj ĉirkaŭ ĝi.

## Lokoj, horaroj kaj aliaj informoj

LEK kutime kunvenas vendredvespere. Kunvenoj je dua vendredo de monato estas surlokaj kaj okazas en nia renkontiĝejo en Highbury. La renkontiĝoj komenciĝas je la 19.15h. Aliaj surlokaj kunvenoj okazas de tempo al tempo kaj por scii pli pri tiuj, bv. viziti la paĝon 'events' ĉe nia retejo. La ceteraj vendredaj kunvenoj okazas kutime en la interreto per la apo Zoom, kun komenc-horo je la 19h. Ĉiuj klubanoj kaj vizitantoj, proksimaj kaj foraj, do havas eblon partopreni en la kluba vivo.

Novaj spektuntoj de la interretaj kunvenoj povas peti ligilon al sekva Zoom-renkontiĝo en tiu ĉi paĝo: londonaesperantoklubo.com/zoom.html.

## Funkciuloj

Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Matt Peperell (prezidanto); Gabriel Beecham (vicprezidanto); Arturo Prent (kasisto); Renato Corsetti (sekretario), Anthony Bodineau (komitatano kaj registristo); Phil Housley, Alexander Hu, Julian Nagele, Maria Schett, Marijus Banaitis (komitatanoj).

La Bultenon kompilas Phil Housley.

## LEK en la interreto

**Retejo:** londonaesperantoklubo.com

**Prelegoj registritaj:** mallonge.net/LEK-jutubo

**Estontaj eventoj:** londonaesperantoklubo.com/eventoj.html

**Eventa Servo:** eventaservo.org/o/LEK

**Fejsbuko:** www.facebook.com/groups/londonaesperantoklubo

**Telegramo:** t.me/+jgGKYWSkGOhlODE0

## Nia renkontiĝejo

La surlokaj kunvenoj de LEK okazas unu fojon monate, kutime la 2-an vendredon de ĉiu monato. La venonta kunveno okazos la 10-an de januaro. La kunvenejo troviĝas ĉe:

Highbury View
89 Ronalds Road
London
N5 1XQ

Mapo: goo.gl/maps/jNtGf5AcG68ogPrq6

Por ĝisdatigitaj informoj pri kiel atingi Highbury View, oni povas ankaŭ konsulti la retejon de TFL ĉe tfl.gov.uk/plan-a-journey.

La ejo estas facile atingebla de la metrostacio Highbury & Islington. Temas pri pli-malpli 10-minuta piedirado.

Atentu, ke **por eniri la ejon, oni bezonas enirkodon**. Se vi ne konas ĝin kaj intencas ĉeesti, bv. kontakti nin per la kontakto-paĝo en nia retejo por havi la kodon.

